

Sud-Rejna Kuriero

Aprilo
2011

Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto

N°42

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

*Karaj membroj, karaj gesamideanoj,
karaj legantoj,*

*Jam komence de 2011 abundas diversaj
Esperanto-eventoj. Plej unue okazis nia
tradicia 3-reĝa festo.*

*En februaro ni retroviĝis por nia
Ĝenerala Asembleo, pri kiu raportas
Frédéric Porretti.*

*La komitato trovis konkretan solvon por
proponi pruntojn el nia biblioteko, nun rete
konsultebla.*

*En marto okazis festo de lingvoj en la
Universitato de Mulhouse. Nia grupo dispo-
nis je ampleksa spaco por informi.*

*Niaj lundaj kunvenoj regule povis okazi kaj eĉ allogis membrojn el la
Bazelo Grupo. Jen konkretaj proponoj en ĉi-tiu numero por la venontaj
monatoj.*

*Komence de aprilo sukcese disvolviĝis la regiona staĝo en Clefcy kun
partopreno de pluraj membroj de nia grupo.*

*Tuj poste en nia kursejo ni povis akcepti du japaninojn, kiuj sukcesis
alveni al Francio malgraŭ la teruraj katastrofoj en Japanio.*

*Ĉi-tiu numero aperas iom malfrue, ĉar en aprilo okazis pluraj Espe-
ranto-eventoj kaj vojaĝoj.*

Malgraŭ tio, ni esperas, ke vi ĝuis agrablajn Paskajn Festo-tagojn.



André Grossmann

Programo 2011

ESPERANTO - SOCIETO BASEL

28.04.2011	Prelego de Hans-Peter pri "La Skoltoj" kaj kantado
30.05.2011	Monata kunveno ĉe Antoine en Saint-Louis,
30.06.2011	Grün'80
14.07.2011	Nacia festo en Francio ?/pikniko ?
26.08.2011	Filmo
25.09.2011 (dimanĉe)	Ekskurso de nia grupo
27.10.2011	Ni parolos pri la ferioj
24.11.2011	Programo
10.12.2011 (sabate)	Zamenhofa festo 2011 en Svislando

Nicole Bérout

Dimanĉe la 8an de majo 2011 malfermitaj pordoj ĉe la Eŭropa parlamentejo en Strasburgo

Ni finfine estas akceptitaj de la Eŭropa parlamentejo en Strasburgo, okaze de la tradicia tago de malfermaj pordoj dimanĉe la 8an de majo 2011, kiel en antaŭaj jaroj (krom en 2010) kaj post iom longa traktado kun la organizantoj...

Tamen estas iu kondiĉo : **ni kontribuu en la debato** kiu okazos en la granda salono inter la 11a kaj 12a30 en la parlamentejo, pri "volontulado kaj bonvolemo en Eŭropo". La ĉefa celo estas ĉeesti la debaton kaj helpi ilin plenigi tiun grandegan salanon.

Ankaŭ vi estos bonvenaj por **deĵori ĉe nia budo** kiun ĉiuj vizitantoj vidos, laŭ la vojo de la vizito. Jam rezervu la 8an de majo por veni en Strasburgo !

Cyrille Hurstel

Ni aldonas la numeron de nia konto PC 40-33714-4 Esperanto Societo Basel por la jarkotizo 2011 al tiuj personoj, kiuj ne aktive partoprenas en nia rondo, la aliaj bonvolu pagi rekte al kasisto. Anticipan dankon.

Membro unuopa:

CHF 25.–

Paro: CHF 30.–

"Globische" Globalisierung ! (Teil 2 von 4)

Frühere Generationen haben großen Wert auf die Korrektheit und die Eleganz der Sprache gelegt. Ebenso wurden literarische Werke in den Schulen behandelt, deren Verse oder Sätze noch lange in unserem Gedächtnis hängen blieben.

Die heutigen pädagogischen Verrücktheiten beweisen nur, dass die Globalisierungsbefürworter - zusammen mit hochgestellten Politikern - die Identität der europäischen Völker zerstören, indem sie die Nationalsprachen mit der Benutzung der anglo-amerikanischen Sprache angreifen. (Wobei unser eigener Anteil nicht zu unterschätzen ist, um modern, weltoffen, gebildet, usw... zu erscheinen (Anmerkung der Übersetzer)).

In der Schweiz, wie in anderen europäischen Ländern haben sich auch Staatsunternehmen diesem Vorgehen verschrieben : so die Post oder die Bahn, z.B. „directory, postmail, Yellowcities, Track &Traces, PickPost, PhilaShop, usw...“. So ist es auch bei den Berufsbezeichnungen wie :*“Hairdressers, Cosmetic Institutes, Municipal governments oder Sanitary Facilities“*.

Auch die Banken gehen in diese Richtung : „Wealth Management, Investment Banking & Securities, Asset Management, Clearing Numbers, usw...“ und die Versicherungen mit : „*Basic Insurance, Hospital Standard Liberty, Service Center, aber auch das Handwerk und der Handel : “Shop, management, coaching, usw...“*. In Frankreich haben sich sogar manche Supermärkte in Carrefour Market umbenannt oder Simply Market verwandelt!

Somit werden Leute, die entweder älter sind oder nicht die Gelegenheit hatten, Englisch zu lernen, buchstäblich von der Gesellschaft ausgeschlossen.



www.ikso.net

www.lernu.net
www.aktuale.info
www.slovake.eu
www.lingvo.info
www.bretaro.net
www.vortaro.net
tradukejo.ikso.net
blog.ikso.net

Tri-reĝa festo en Espace 110



Marde vespere okazas kutime nia kurso por komencintoj. Tamen tiu unua mardo de la jaro 2011 estis rezervita por nia tradicia 3-reĝa festo.

La longa tablo de nia kursejo aparte taŭgis por akcepti niajn gastojn, kiuj venis ne nur el niaj rondoj, de Mulhouse, de Village-Neuf, de Stosswihr, sed ankaŭ el proksima Germanio. Tial ni ankaŭ akceptis niajn gastojn Konrad Gramelspacher kaj Paulo Finus.





Niaj gereĝoj Frederiko kaj Anne



Anne estis nia reĝino

Tre baldaŭ surtabliĝis teleroj, glasoj, boteloj kaj 4 grandaj migdalo-tortoj. Ĉi-tiuj lastaj estas la kontribuo de nia asocio por tiu festo. Kelkaj partoprenantoj volonte alportis botelojn da Alzaca vino aŭ aliajn trinkaĵojn.

Ni kune tostis je la nova jaro, por la sukceso de Esperanto en nia grupo kaj en niaj diversaj aktivaĵoj.

Kiuj ekestos la reĝoj kaj reĝinoj de tiu vespero ? Pri tio decidis la sorto de la torto-pecoj en kiuj troviĝas la kaŝitaj faboj. Sinsekve iĝis reĝo kaj regino, Andreo, Anne kaj Frederiko. Ĉiu surmetis la kronon.

Dum la tuta vespero regis simpatia etoso, kaj diskutoj pri estontaj agadoj.

Ankaŭ estis la ebleco por iuj membroj pruntepreni librojn el nia biblioteko, kiu nun funkcias per la reto.



Nia festeto finiĝis kun 3 gereĝoj en simpatia kaj bona etoso.

Fotoj kaj raporto de Andreo

Agad-raporto de Mulhouse- Espéranto por 2010

En januaro okazis la tradicia renkontiĝo de la grupanoj nomata la **3-reĝo festo** en la Spaco 110.

La laŭleĝa **Ĝenerala Membro-Kunveno** okazis en la sama loko en Februaro.

En marto, en la universitato de Mulhouse okazis **festo de lingvoj**, tie estis nia inform-budo por infomi pri Esperanto. Profesorino kaj 3 lernantinoj venis el Hungario. Ili ĉeestis en la Spaco 110 agrablan **interkonatiĝan vesperon**, kiun nia grupo proponis al ili..

En majo okazis agrabla **paroliga vespero** en la Spaco 110 kaj ankaŭ **amika kunveno** kun bazelaj grupanoj.

La **komuna manĝo** de nia grupo okazis fine de junio en la restoracio ĉe Papy Roberto en Morschwiller le bas.

En septembro, la kolegoj de Village-Neuf organizis **viziton kaj migradon en la petite Camargue**.

Komence de oktobro, la kultur-jaro komenciĝis en la Spaco 110, 4 komencintoj kaj 3 progresantoj partoprenas en la du kursoj.

Dum la festivalo **Bédéciné** en Illzach, nia grupo havis inform-tablon kaj semajnon poste ĉeestis en Ungersheim dum la **justa komercado**-tago.

Preleganto el Japanio venis al la Spaco 110 por prelegi, nia grupo kore akceptis lin, 2 universitataj gestudentoj ĉeestis.

La gegrupanoj de village neuf organizis la **Zamenhofan feston** ĉi jare, germana asocio, svisa asocio kaj nia asocio kuniĝis en tiu triregiona renkontiĝo.

Regule, kvarfoje jare, aperis nia bulteno SRK.

Nia retejo **<http://mulhouse.esperanto.free.fr>** daŭre informas pri la diversaj aktivecoj de nia grupo, kaj ankaŭ de la regiono.

Nia dissendo-listo **mulhouse-esperanto@yahoogroupes.fr** refoje montris sian utilecon por rapide kaj akurate informi niajn membrojn pri lokaj eventoj.

La Sekretario, Frédéric PORRETTI.

La pagintaj membroj de Mulhouse-Esperanto trovos en ĉi-tiu numero la finanĉan raporton por la jaro 2010.

Nia Ĝenerala Asembleo

La Ĝenerala asembleo okazis en la espace 110 la 3an de februaro 2011 . Ĉeestis s-inoj Simone Kiry, Denise Heinrich, Anne Vernet kaj s-roj Maurice Schlewitz, André Grossmann, Edmond Ludwig, Jacques Pineda, Robert Kueny, kaj Frédéric Porretti.

La last-jara raporto verkita de nia sekretario Frédéric Porretti aperis en la numero 38 de SRK, ĝin legis nia prezidanto, ĝi estis unanime akceptita, La sekretario ankaŭ prezentis la kompletan agad-raporton de la jaro 2010. La prezidanto prezentis la finanĉan raporton de 2010 kaj liston de membroj kaj abonantoj de la nuna jaro 2011

Ambaŭ raportoj estis unuanime aprobitaj.

Finiĝis la mandato de jenaj komitatanoj : Alexandra MUSSABINI kaj Robert KUENY. Ili estis unuanime reelektitaj kaj kiel nova komitatano estis alelektita Anne VERNET.

La nova komitato elektis la estraron por la jaro 2010. Ĝi estas jena:

Prezidanto: André Grossmann

Sekretario por la franca: Robert Kueny

Sekretario por Esperanto : Frédéric Porretti

Kasista funkcio: André Grossmann

Eksteraj rilatoj: Simone Kiry

Propagando: Jacques Pineda

Nia biblioteko ankoraŭ ne sukcesis konkrete funkcii. Andreo intertempe jam sukcesis aldoni paĝon en nia retejo kaj proponas, ke okaze de kurso, kunveno eblas prunte-ricevi kaj redoni la librojn. Ankaŭ en ĉi-tiu numero aperas la listo. Laŭ la iniciatoj de Jacques kaj Bertrand nun funkcias la lundaj konversaj kunvenoj. Ni daŭrigu ilin tiel.

Inter venontaj agadoj, ni nepre partoprenu en Ungersheim, Bédéciné, Wesserling. Krome plej unue okazos festo de lingvoj en la universitato de Mulhouse la 12an de marto. Edmond ŝatus, ke deĵoru iuj liaj studentoj. La libro-foiro en Saint-Louis estas relative kosta, kaj jam tro malfrue por ĝin partopreni. Ni esploru por 2012.

Ekestis diskuto pri la difino de membro de ME kaj simpla abonanto al SRK. Roberto proponas lasi la elektablecon. Tion nun proponas la nova kotizo-tabelo.

La sekretario , Frédéric Porretti

Nia biblioteko en nia retejo

Nia biblioteko konsistas el libroj, kiujn nia asocio ricevis de s-ro Damotte. Vi trovos la liston de libroj en la ĉi-apuda tabelo. Ili estas je la dispono de niaj membroj.

Kiel prunte-ricevi librojn?
En nia kultur-domo Espace 110 regule okazas kursoj, marde kaj ĵaŭde vespere de la 18a30 ĝis la 20a. Tiam estos okazo ricevi la petitajn librojn.

Por peti librojn, bonvolu sendi mesaĝon al la ret-adreso de nia grupo aŭ telefoni al 03.89.45.62.89. Tiam vi indiku la librojn, kiujn vi deziras prunte-ricevi kaj la tagon, kiam vi planas veni al Espace 110.
La kursgvidanto tiam kunportos la librojn por vi.

Komprenoble tiu servo estas rezervita al niaj membroj, tial vi senprobleme trovos la ret-adreson sur ĉiu numero de nia bulteno SRK. Uzu ĝin por peti la librojn.
Poste via nomo estos menciita en la listo por eviti, ke alia membro petu la saman libron.

La libroj povos esti redonitaj okaze de la vesperaj kursoj, marde aŭ ĵaŭde aŭ eĉ esti deponitaj ĉe la akceptejo de Espace 110 ĉe la fako de nia grupo

Sam-okaze bonvolu informi al nia ret-adreso vian redonon.
Ni esperu, ke tiu nova servo povos kontentige funkcii kaj esti utila al niaj membroj.

KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2011-2013

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno **Sud-Rejna Kuriero**. Ĝi ebligas partopreni la aktivajojn de nia asocio kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

Sed ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

Jaro	Kotizo	Abono
2011	6,00 eŭroj	6,00 eŭroj
2012	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj
2013	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj

Pagebla al André Grossmann, 5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM

Ĉekojn je la nomo de: Mulhouse-Esperanto
CCP 19684 F Strasbourg.



	Titolo	Aŭtoro	Eldonejo
1	AMUZAJ DIALOGOJ en EO	Albert LIENHARDT	UEA 1973
2	Cours Pratique d'Espéranto	Elémentaire et supérieure	1936 Paris LIB.Centrale Espé-
3	Cours Pratique d'Espéranto	Elémentaire et Supérieur	1947 Paris Librairie Centrale Es-
4	Dictionnaire complet Frs-EO	GROSJEAN-MAUPIN 1924	Paris 31, rue de Clichy 9 E.
5	Eo 100 jaroj de internacia kul-	Osùo Buller	UEA 72 UK 1987 Varsovie
6	Eo die Internationale Sprache	Erich HOLSCHER	Nurnberg
7	Eo EN PERSPEKTIVO	IVO LAPENNA (Ulrichh	London-Rotterdam 1974 de
8	Eo sen peno	4 kasedoj	Assimil
9	Epoko-La Knaboj de Paŭlo-	Francisko MOLNAR Vol.II	el la Hungara tradukis
10	Epoko-La Karnavalo kaj La	Karl LEBRECHT IMMER-	Anglujo Vol.XI 1952
11	Epoko-Brulanta Sekreto	Stefan ZWEIG	Anglujo-Vol.IX 1949
12	Esperanto katalogo	UEA	1988/89 UEA
13	Etnografiaj Donitaĵoj		HANOJO 1974
14	FAKTOJ kaj FANTAZIOJ	Marjorie BOULTON	UEA 1984
15	Fundamento de Esperanto	ZAMENHOF	E.F.E. 9 ^{ème} édition 1963
16	Initiation Théorique Et Pratique	Dr.Pol DENOEL	SONORILO Kerklaan 61-
17	Kongres-libro 57a UK 1972	UEA	UEA Portanlando Oregon
18	Kongres-libro 62a UK 1977	UEA	UEA Reĵaviko
19	Kongres-libro 72a UK 1987	UEA	UEA Varsovio
20	Kvara Libro NOMBROJ	ZAMENHOF	1914 PARIS HACHHETTE
21	L'Espéranto fil d'Ariane du	Pierre DELAIRE	1959 Orléans
22	LA BIBLIO - NOMBROJ	ZAMENHOF	Hachette 1914
23	LA INTERNACIA LINGVO	IVO LAPENNA	UEA Anglujo 1954 Londono
24	LA SANKTA BIBLIO	Malnova kaj nova Testamen-	Londono 1972
25	La Sunkrono	Marie KOENEN	Malnova Turo 1937
26	Ladislao Spierer	HERTS	Anglujo-
27	Lexique Fondamental	Albert LIENHARDT	Collection NOVA
28	Manuel d'Initiation EO	Albert LIENHARDT	Collection NOVA
29	Manuel de Perfectionnement 3	Albert LIENHARDT	Collection NOVA
30	MARTA	Rakonto de Eliza ORZESZ-	Paris Espérantista Centra Libre-
31	Ni parolu en Esperanto	André RIBOT	Marmande 2 ^{ème} édition 1960
32	Nouveau cours rationnel et	SAT	SAT-AMIKARO 1973 Paris
33	Orthographe Optimale x 2	Albert Lienhardt	
34	Pasoj Al Plena Posedo	Auld	1984 Budapesto – Madri-
35	Paŝoj Al Plena Posedo	Auld	Bruxelles 1974-Praha HEROL-
36	Plena Ilustrita Vortaro	SAT	SAT 1970
37	Retoriko	Ivo LAPENNA	3 ^{ème} édition Rotterdam 1971
38	Revue Française d'Eo AN-DROMAKA	Jean RACINE	N-393 juin 1988 UFE
39	Trigrosa Romano	BRECHT	Edition Leipzig 1977
40	Vivo De Zamenhof	Edmond PRIVAT	5.Edition 1967 Anglujo

Mikaelo Bronŝtejn en Frajburgo

Kadre de sia turneo tra Germanio la rusa Esperanto-kanzonisto kaj poeto Mikaelo Bronŝtejn koncertis en januaro en multaj germanaj urboj, interalie ankaŭ en Stuttgart kaj Freiburg.

En ambaŭ urboj la organizantoj invitis al la evento krom la Esperanto-publikon ankaŭ surloke loĝantajn rusojn kaj lernantojn de la rusa. En ambaŭ lingvoj, en la rusa kaj en Esperanto, la bardo ravis sian publikon. La rusaj koncert-vizitantoj ĝuis la hejmecajn melodiojn kaj miris pri la esprimovo de la lingvo Esperanto; la esperantlingvaj aŭskultantoj sentis, ke jen talenta artisto ligas popolan tradicion kun la rimedoj de la Internacia Lingvo. La prezentado de la rus-tradiciaj kanzonoj impresis ankaŭ la malgrandan grupon de koncertvizitantoj, kiuj regas nek la rusan, nek Esperanton. Per la traduko al la germana la aranĝo eĉ estis trilingva, per la jidaj kantoj eĉ kvarlingva.

Lerte la poeto esprimis ritme-rime kaj bilde-babile siajn travivaĵojn. Li prezentis sian plurlingvan hejmurbon en Ukrainio per infankantoj de siaj ukrainaj kaj rusaj, polaj kaj jidaj najbaroj. De omaĝoj al vizititaj urboj ĝis plej freŝdata rakontkanto pri la ĉi-novjara Internacia Festivalo en Nördlingen, Bavario, la koncerto prezentis larĝan gamon da temoj.

Bronŝtejn riĉigas la Esperanto-kulturon ne nur per sia poezia verkaro, sed ankaŭ per prozo. Li eldonis diverstipajn Esperant-lingvajn rakontojn de aŭtoroj, kiuj ĝis nun ne publikigis. Kaj li mem tradukis rusan klasikan literaturon esperanten. Per sia verko "Dek tagoj de kapitano Postnikov" li donacas al la Esperanto-komunumo ankaŭ historian romanon, kiu profundigas la kolektivian memoron de la Esperanto-parolantaro.

Espereble ankaŭ en la jubilea jaro 2012 Mikaelo Bronŝtejn denove en Germanio per sia muziko heroldos pri la Esperanto-kulturo al plurlingva publiko.

Edmond Ludwig

Mikaelo Bronŝtejn
Михаил Бронштейн

Chansons in
Russisch und
Esperanto

Freitag
7. Januar 2011
20 Uhr

Eintritt frei
Buffet 10 €

Gaststätte AMBIENTE
Waldkircher Str. 1
Freiburg

mit freundlicher
Unterstützung von



Aktualigitaj informoj aperas ĉe:

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>

Eble Esperanto-kurso en Colmar dank'al CHARITE AFRICAINE DE COLMAR

Sabate, la 26-an de februaro 2011 ni partoprenis la komitato-kunvenon de nia afrika asocio CHARITE AFRICAINE DE COLMAR. Ties vicprezidanto, Sinjoro MAYI, raportis tie pri la konferenco-debato, kiun ni ĉeestis en la universitato de Strasburgo, sabate la 19-an de februaro, kie ni renkontis diversajn esperantistojn de Strasburgo kaj de Germanio.

Kiel kultura reprezentanto mi raportis pri la renkontiĝo kun Sinjoro Edmond LUDWIG, prezidanto de Espéranto France-Est. Poste mi prezentis nian projekton :

- starigi konferenc-debaton kun la temo : Esperanto kiel garantio por lingva diverseco en Afriko.
- Kiel enigi Esperanton en la afrikajn lernejojn laŭ la rekomendoj de UNESCO
- Organizado de Esperanto-kurso en COLMAR.

La geestraranoj de la asocio adoptis la ideon kaj petis s-ron Fernando eklabori la kalendaron, kiun li prezentos al la Ĝenerala Asembleo, kiu okazos en junio.

Por via informo, la asocio " CHARITE AFRICAINE" de Colmar estas kreita laŭ la konsiloj

de la katolika pastro Jean Claude Klose de la paroko Sankta Maria de Colmar kaj jam estas akceptita de la prefektejo de Colmar. La asocio ankaŭ volas membriĝi en IKUE

Kultura kaj socia respondeculo de CHARITE AFRICAINE DE COLMAR, kies prezidanto estas Sinjoro Mbiyavanga MAYI

Ĉiu ajn helpo al tiu iniciato bonvenos. Bonvolu kontakti ilin.



S-ro Fernando NKANU
Ĉambro N° 51
CADA 4, rue d'Amsterdam
68000 COLMAR
Telefono 0623188876
angolafernando@yahoo.fr

Nia dissendolisto:

mulhouse-esperanto@yahoogroupes.fr

ebligas rapide informi niajn membrojn pri eventoj aŭ aktivaĵoj, kiuj ne povis esti menciitaj en nia bulteno. Se vi ankoraŭ ne estas enskribita en tiu listo, ni invitas vin aliĝi per sendo de mesaĝo al


mulhouse-esperanto-abonnement@yahoogroupes.fr

Poste yahoo aŭtomate sendos al via ret-adreso konfirmo-peton, kiun vi simple resendu sen kroma aldono. Poste la administranto povos akcepti vian aliĝon.

La festo de la lingvoj en la Universitato de Alta – Alzaco (Mulhouse)

La elstarigita lingvo estis la bretona, pli ĝenerale nomata « gallo ». Sed jam la trian fojon Esperanto gastis en la Fakultato pri Beletro, Lingvoj kaj Sociaj Sciencoj de Mulhouse. Deĵoris la 12-an de marto 2011 ĉe la budo du gestudentoj de la nunjara kurso, Caroline kaj Hugo, helpataj de Fernando Nkuma, André Grossmann kaj Edmond LUDWIG. Tiu, kiu ne nur deĵoris ĉe la budo estis nia senlaca varbanto Roberto KUENY : jen li elstare, parkere, deklamis la esperantan version de la fablo de Jean de LA FONTAINE La cikado kaj la formiko. Dankon al ĉiuj helpantoj, kiuj ankaŭ estis salutitaj de la senlaca subtenanto de Esperanto : la dekano Yann KERDILES.

Edmond Ludwig



Vasta spaco metita je nia dispono ebligis starigi sur tabloj la 12 panelojn de Esperanto-France, kiujn Edmond laste akiris.



Jen inter Roberto kaj Edmondo Fernando el Angolo, nun loĝanta en Colmar.

Apud Roberto ankaŭ deĵoras Caroline, ĉi-jara studentino en la Esperanto-kurso en la Universitato.



Studentinoj el la urbo Arĥangelsk prezentis lokajn produktojn, dancojn kaj kantojn.

Profesorino pri kaligrafio proponis al la publiko skribi per japanaj kanĝi iliajn nomojn.



Lundaj konversaciaj kunvenoj



En lasta januaro Bertrand Wick kaj Jacques Pineda iniciatis konversaciajn kunvenojn kun la celo plibonigi la esperantlingvan konversacian nivelon de la partoprenantoj, en amika rondo.

Estis decidite ke tiaj kunvenoj okazu principe ĉiujn lastajn lundojn de monato aŭ eventuale en la tuj posta lundo, alterne en la regiono de Saint-Louis kaj en Mulhouse, ĉu en restoracio aŭ ĉe membro.

La unua tia kunveno okazis la 7an de februaro en la hejmo de Antoine kun 8 partoprenantoj.

La 7an de Februaro
ĉe Antoine



Jacques proponis por la 28a de februaro renkontiĝi en restoracio "La table de la Fonderie" "21 rue du manège" en Mulhouse.

Jacques unue iom rakontis pri tiu kvartalo La Fonderie (Fandejo) Tie ni ankaŭ kune vespermanĝis.

La 28an de Februaro
en Mulhouse



La 28an de marto Bertrand Wick proponis renkontiĝi en la propra hejmo. Li krome ankaŭ invitis membrojn de la Bazela Grupo. Tial nia rondo estis eĉ pli ampleksa

Tre lerte li sukcesis proponi diversajn manĝaĵetojn kaj trinkaĵojn por plezurigi ĉiujn. Kompreneble ankaŭ viglis la konversacioj. Eble la kunvenoj en la regiono de Saint-Louis povus estonte ankaŭ esti komunaj kunvenoj kun la grupo de Bazelo.



La 28an de marto ĉe Bertrand

Ĝis nun ni ankoraŭ ne menciis tiujn lundajn konversaciajn kunvenojn en nia bulteno SRK. Sed dank'al nia dissendo-listo:

mulhouse-esperanto@yahoogroups.fr kaj al nia retejo
<http://mulhouse.esperanto.free.fr>

ni povis rapide informi niajn membrojn pri ili. Kompreneble ĉar la tuto estis decidita nur en januaro post la apero de nia lasta numero.

Niaj venontaj kunvenoj okazos

◆ **Aprilo**

- ◆ lunde la 2an de majo de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo "le Printemps " 7 strato du printemps 68100 Mulhouse. Eblas tie trinki kaj simple manĝi, eble kolbasetojn kaj salaton.

◆ **Majo**

- ◆ lunde la 30an de majo de la 19a ĝis la 20a30 en la hejmo de Antoine, 7 rue des Etangs, Saint-Louis-Neuweg

◆ **Junio**

- ◆ lunde la 2an de junio de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo "le Printemps " 7 strato du printemps 68100 Mulhouse.

Dum niaj kunvenoj diversaj temoj povas esti pridiskutataj, laŭ la proponoj de la partoprenantoj. Ankaŭ spontanaj diskutoj povas okazi. Kompreneble la celo estas uzi la lingvon en konversacio, tial ni uzu nur **Esperanton** kaj **plene evitu krokodiladon**, kiu povus plene fuŝi la celon de niaj kunvenoj.

Per nia dissendo-listo ni akurate konfirmos la kunvenon, tial ne forgesu regule konsulti viajn mesaĝojn.

Andreo

69a Regiona Staĝo de Esperanto en Le Vic

La regiona staĝo de Esperanto-France Est ĝuis plenan sukceson pro la nombro da personoj, la internacia etoso, pro abunda programo kaj pro la vere printempa vetero en bela Vojeza naturo.

Jen, en la vilaĝo Le Valtin ni vizitis bombonejon. La partoprenantoj povis ĉeesti la fabrikadon de bombonoj kun bonaj klarigoj pri la procedo.



Bardhyl SELIMI estis nia ĉefa preleganto. Lia temo estis Albanio. Li klarigis pri kulturo, la lingvo, la politika situacio. Li respondis al pluraj demandoj rilate la nunaj eblecoj turismi en la lando.

Dume, aliaj partoprenantoj kolektadis plantojn, kun gvidatoj de fakulino.





Poste antaŭ la vespermanĝo, ĉiuj povis gustumi la preparaĵojn faritajn per tiuj plantoj.



Vespera koncerto de FAMO

Bela surprizo estis la koncerto aranĝita por la ĉeestantoj de la staĝo la lastan vesperon. Estis invitita la blinda kantisto kaj muzikisto FAMO, el Parizo, akompanata de sia maroka amiko Tarek. La kanzonoj, kiuj daŭris pli ol 90 minutojn havis varian temaron aktualan kaj la voĉo de FAMO estis tre dolĉa kaj potenca.

Bardhyl SELIMI



Dank'al bela printempa vetero regis aparte simpatia etoso. Gratulojn ricevis la organizantoj fare de la prezidanto de EFE.

Tekstoj kaj fotoj de Andreo

Festeto en Espace 110 kun akcepto de japanaj gastinoj

S-inoj Keiko SAMPEI kaj Makiko KASAI sukcesis atingi Francion la unuan de aprilo 2011, malgraŭ malfacilaj transport-kondiĉoj post la terura katastrofo en Japanio kaj ĉefe en Sendaj, de kie venis Keiko.

Ambaŭ plezure partoprenis la regionan staĝon en la Vogezoj kaj poste estis niaj gastoj. Tiam la 5an de aprilo anstataŭ nia kurso por komencintoj, ni okazigis festeton por akcepti ilin en nia kursejo.

Abundis la diversaj kukoj, tortoj kaj trinkaĵoj, kiujn la partoprenantoj volonte kunportis.

Tamen antaŭ ol frandi ilin en tiu vespera programo, Keiko proponis prezenti japanan paperan teatron. Ŝi kunportis 2 teatraĵojn: "La Maro en Kalijusi" kaj "Sovaĝa Rozo".

Poste ni pli bone interkonatiĝis kaj multajn demandojn ricevis Keiko pri la situacio en Japanio. Ŝi rakontis pri siaj propraj spertoj en urbo Sendaj, kiu ja suferis pro la tertremo kaj cunamo. Feliĉe ŝia domo staris pli alte je 20 km de la cunamo, kiu ja detruis grandan parton de la urbo. Ŝi ankaŭ montris plurajn japanajn gazetojn kun mapoj pri damaĝitaj orientaj marbordo.



Fotoj kaj tekstoj de Andreo

Nia Kalendaro 2011

Aprilo 2011	19a 7a	Kursoj por komencintoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a
Majo 2011	2a 3 - 10 - 17 - 24 - 31aj 5 - 12 - 19 - 26aj 30a	Lunda konversacia kunveno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo "le Printemps " 7 strato du printemps 68100 Mulhouse Kursoj por komencintoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a Lunda konversacia kunveno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 20a30 en la hejmo de Antoine en Saint Louis, 7, rue des Etangs
Junio 2011	7 - 14 - 21 - 28aj 9 - 16 - 23 - 30aj 27a 1am, ie	Kursoj por komencintoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a Lunda konversacia kunveno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo "le Printemps " 7 strato du printemps 68100 Mulhouse Ni kune festos la finon de la nuna lernojaro.



Poŝtmarko eldonita por la Inter-asocio Renkontiĝo en Sète en aprilo 2011

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.

Esperanto en abiturienteco

Petici-kampanjo por Esperanto en abiturienteco estis lanĉita en Sète okaze de la Internacia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo (IREM — 22-26 de aprilo 2011).

Jam multaj famuloj el la mondo sciencista, artistista, sportista, religia, politika, akceptis, ke ilia nomo estu videbla en la listo de subskribintoj (1217 subskriboj entute ĝis la 28a de aprilo 2011). La patronecon de tiu kampanjo akceptis la profesoro Albert Jacquard, genetikisto, eseisto, humanisto.

Estas dezirinde, ke tiu kolopodo stimulu samajn iniciatojn en la tuta mondo kaj kontribuu al subteno al klopodoj okazantaj nun en Brazilo. Ne sufiĉis la kvanto da presita dokumentaro por la cirkonstanco : 10 000 ĵurnaloj, 50 000 flugfolioj kaj 2500 afiŝoj.

Speciala retejo estas dediĉita al tiu kampanjo :

Campagne pour l'espéranto au bac — <http://esperanto-au-bac.fr/>

Elŝuteblaj dokumentoj :

- afiŝo PDF "L'espéranto au bac ?", 50x70cm (66,9 Mb) <http://esperanto-au-bac.fr/squelettes/telechargement/affiche.pdf>
- 4-paĝa ĵurnalo : <http://esperanto-au-bac.fr/squelettes/telechargement/journal.pdf>
- flugfolio A5
- petici-folio A4 : <http://esperanto-au-bac.fr/squelettes/telechargement/feuille.pdf>

Ĉar la diskonigo de tiu kampanjo estis ĝis nun ne tre granda, necesas ke ĉiu klopodu por plue diskonigi ĝin, ne nur al familianoj, kolegoj aŭ aliaj konatoj, sed ankaŭ al elektitoj : deputitoj, senatanoj, urbestroj, al famaj personoj el diversaj medioj : arta, scienca, filozofia, religia, politika, sporta, asocia, industria, komerca (ekz. Komercaj Ĉambroj, ktp)...



Aldone al ĉi-tiu numero kaj por adresoj en Francio estas kun-metitaj peticio-folio kaj malgranda prospekto.